Seliŝĉev Aleksandr
Селищев Александр

Tradukita el la rusa 11.07.2013

«Lingvo» kaj «mono»: kompara analizo de du kategorioj

«Язык» и «деньги»: сравнительный анализ двух категорий

"Language" and "Money": comparative analysis of two categories

Mono estas lingvo de ekonomio;
Lingvo estas oro de homaro.

La lingvo estas ilo de komunikiĝo, rimedo de esprimo de penso, de akumulado kaj transdonado de informo. Ĝi servas per «daŭrigo» de homa cebro, simile al tio, kiel materiaj iloj estas «daŭrigoj» de homaj manoj, piedoj kaj organoj de sentoj. La ila ĥaraktero de lingvo stimulis multajn esploristojn aliri al liaj elementoj kiel al produktoj de laboro. Tiele en teorio de la lingvo aperis direkto, penanta analizi ĝian funkcionadon en terminoj de ekonomika teorio.

Paraleloj inter varo kaj lingvo efektiviĝis ankoraŭ ***Karlo Markso*** (1818-1883), rimarkiginta, ke tia kaj alia kategorio estas socia produkto de homoj [6, p. 84]. Elstara lingvisto ***Ferdinand de Saussure*** (1857-1913) ankaŭ komparis sciencon pri lingvo kun ekonomika scienco [13, p. 117]. En 1971 jaro la soveta lingvisto ***V.G. Gak*** (1924-2004) publikigis verkon, en kiu li penis kompari kategoriojn «lingvo», «ilo» kaj «varo», sin apoginte sur verkoj de partujaj kaj alilandaj esploristoj [1, p.161-177], kaj, antaŭ ĉio, sur monografio de italia lingvisro ***Ferruccio Rossi-Landi*** (1921-1985) «La lingvo kiel laboro kaj kiel merkato» [15].

Rossi skribis, ke la lingvo, kiel ankaŭ la laboro, diferencigas homon de animalo. Dum procedo de komunikiĝo vortoj kaj esprimoj fariĝas «varo», kaj lingva kolektivo – «merkato». Post italia esploristo ***V.G. Gak*** komparas la paroj de kategorioj «lingvo-ilo» kaj «lingvo-varo».

La konkludo de soveta lingvisto estas tia: «Se gomologio inter lingva agado (*langage*) kaj merkato, inter unuoj da lingvo (*langue*) ne ŝajnas konvinka kaj ekscitas multajn kontraŭdirojn, la komparado de *language* kun labora agado, kaj

lingvaj unuoj kun aĵoj de materia produktado, aparte, kun iloj, portantaj difinan funkcion, ovras interesajn perspektivojn, precipe se tion ĉi komparadon produkti ne nur en struktura, sed en funkcia aspekto» [1, p.175].

Efektive, la komparado de lingvo kun ekonomikaj kategorioj eble kaj perspektive precize sur la finkcia bazo. Kvintesenco de vara produktado, kiel konate, estas *mono*. ***K. Markso*** emfazis, ke la mono estas la varo de varoj, la varo de speciala genro. Tra mono ĉiuj varoj estas komparitaj inter si. Pere de mono varoj interŝanĝas unu kontraŭ alia. Pere de mono la proceso de interŝango povas ekzisti ne nur en la spaco, sed en la tempo (kredito, templimaj interkonsentoj). Ni provu kompari kategoriojn «lingvo» kaj «mono» sur la bazo de plenumintaj per ili funkcioj. Antaŭ okupi per funkcioj, ni marku, en kio estas entenata la simileco kaj difirenco de tiaj du kategorioj.



Bildo 1. Loko de mono kaj lingvo en sistemo de aktivoj

Kaj lingvo, kaj mono estas socialaj kategorioj. Sed se la lingvo estas kategorio precipe sociala, la mono estas socia-ekonomia. Tio ĉi signifas, ke la lingvo mem estas ekster la sfero de ekonomiaj rilatoj. Kaj lingvo, kaj mono estas, uzante ekonomikan terminaron, aktivoj. Kio estas la aktivo de vidpunkto de ekonomika scienco? La aktivo estas ĉiu utila por homo aĵo. Samtempe, aktivoj estadas ekonomiaj kaj neekonomiaj. Por akiri ekonomian aktivon, homo devas allasi en interŝanĝon alian aktivon, aŭ ricevi ekonomian aktivon kiel rekompenco por sia labora agado (t.e. «perlabori»).

Aktivoj, kiuj homo povas ricevi «senpage», estas neekonomiaj kaj per ekonomika teorio ne esploriĝas. Pro tio la lingvo en sferon de interesoj de

ekonomiko ne entras. Senpagaj aktivoj estas atmosfera aero kaj precipitaĵo, akvo en natura akvujo, klimato, suna energio, branĉaro en arbaro ktp. Tien ĉi apartenas ankaŭ la lingvo, kiu, tamen, diferencas de ĉiuj nomitaj supre neekonomiaj aktivoj per tio, ke ĝi imanente estas propra al homo kaj de homo estas neapartigata. Precize en tranĉo «ekonomia aktivo» kaj «neekonomia aktivo» implicas principajn diferencojn de lingvo de ekonomiaj aktivoj, en tiu kvanto – de mono. Sur la **bildo 1** estas figurita klasifiko de aktivoj.

Jam sur jena stadio de analizo eble fari antaŭan konkludon: kategorio «mono» havas unuagradan sencon por ĉiuj ekonomiaj aktivoj dum kondiĉoj de merkata ekonomio. Ĉiuj ekonomiaj aktivoj memrealiĝas kun helpo de mono. De alia flanko, tuta aro da aktivoj (ekonomiaj kaj neekonomiaj) en homa societo memrealiĝas kun helpo de lingvo. Se mono estas la alfa kaj la omega de ekonomia vivo de moderna homo, tiam lingvo estas la alfa kaj la omega de vivo de homo en ĉiuj de lia sferoj de agado.

La esenco de kategorio plej bone ovriĝas en ĝiaj funkcioj. Pro tio vi haltas sur rigardo de funkcioj de mono kaj lingvo.

1. Funkcioj de mono

Tradicie ekonomika teorio distingas ***kvin*** funkciojn de mono: mezurilo de valoro, rimedo de cirkulado, rimedo de pagado, rimedo de akumulado kaj monda mono. Ni ekiris plue, distinginte ***la ĉefan***, ***la bazajn*** kaj ***derivaĵajn*** funkciojn de mono [12, p. 16]. La secifikeco de ĉefa funkcio estas entenata en tio, ke ĝi estas universala kaj difinas kvintesencon de la kategorio. Ĝenerale sufiĉe difini la ĉefan funkcion, por aperigi la plej profundan esencon de esplorinta fenomeno.

La ĉefa funkcio de mono *estas entanata en kreado de optimumaj kondiĉoj de interŝanĝo, redukto al minimumo de tempo kaj transakcioj kostoj kiel sekvo de absoluta likvideco de mono.*

Estas konvenaj en ligo de tio ĉi la vortoj de ***Murray Rothbard*** (1926-1995): «En multaj ekonomikaj lernolibroj asertiĝas, ke mono plenumas kelkajn funkciojn.

Mono estas kaj rimedo de interŝanĝo, kaj unuo de kalkulo, kaj «mezurilo de valoro», kaj «rimedo de konservado de valoro», ktp. Tamen ĉiuj tioj ĉi funlcioj estas simplaj sekvoj de unuo – ĉefa: servi per rimedo de interŝanĝo» [11, p. 28].

Homo, vivanta kaj laboranta solece, ne bezonas manon. Mona neceseco malaperas, se mankas vara interŝanĝo. Pro tio ke mono estas ilo de interŝanĝo, necese, ke tia interŝanĝo estus normo de homa agado. La ĉefa destino (la ĉefa funkcio) de mono en ekonomia sistemo reduktas al maksimuma malkarigo kaj plirapidigo de proceso de interŝanĝo per bonaĵoj (**bildo 2**).



Bildo 2. Sistemo de funkcioj de mono

La ĉefa funkcio konkretiĝas en **bazaj** kaj **derivaĵaj** funkcioj de mono. La bazaj funkcioj determinas **esencon** de mono, la derivaĵaj funkcioj tion ĉi esencon ne determinas, sed **konkretigas** kaj **suplementas**.

La bazaj funkcioj de mono. Dum distanco de daŭra historio sur diversaj iliaj etapoj mono plenumis kvin bazaj funkcioj: rimedo de cirkulado, mezurilo de valoro, rimedo de akumulado, rimedo de pagado kaj monda mono. La funkcioj de mono formas **esencon** de tia kategorio. Ili estas dum kontinua disvolviĝo. Graveco de ĉiu de ili dum diversaj historiaj etapoj povas plialtiĝi aŭ malplialtiĝi (iam

praktike ĝis nulo). La plej gravaj de la bazaj funkcioj estas *rimedo de cirkulado, mezurilo de valoro kaj rimedo de akumulado*.

1. Mono kiel rimedo de interŝanĝo (cirkulado). Jena funkcio pli plene de ĉiu konkretigas **la ĉefan funkcion** de mono: precizigas, kiamaniere mono kontribuas al interŝanĝo de bonaĵoj unu al alia. Funkcion de mono kiel rimedo de cirkulado povas plenumi *ĉiu* materia aĵo (konketoj, brutaro, feloj, ingotoj de metalo, pecoj de papero, elektronikaj notoj ktp). Sed la aĵo, plenumanta funkcion de cirkulado, devas havi esencan econ: homoj devas esti *konsentaj* interŝanĝi monon al ĉiuj aĵoj kaj kontraŭe. Mono kiel rimedo de cirkulado esence **malplialtiĝas transakciojn kostojn** kaj **multfoje pligrandigas librecon de elekto**.

Dank'al funkcionado de mono kiel rimedo de cirkulado, venkiĝas tioj tempaj kaj spacaj limoj, kiuj estas ĥarakteraj ĉe senpera interŝanĝo de varo al varo. Sed tio signifas, ke **mono kiel rimedo de cirkulado komtribuas al disvolvoĝo de vara interŝanĝo, dividlaboro, specialigo kaj ekonomia progreso en tuto**.

2. Mono kiel mezurilo de valoro (kalkulanta unito). La funkcio de mono kiel mezurilo de valoro permesas redukti al minimumo la nombro da prezaj taksoj. Kune kun tio, *la funkcio de mono kiel mezurilo de valoro estas neseparebla de funkcio de mono kiel rimedo de cirkulado*. Ĉe interŝanĝo de varoj inter ili aperas difinitaj ŝanĝaj proporcioj.

La funkcioj de mono, mezurilo de valoro kaj rimedo de cirkulado, estas neseparebleligitaj unu kun alia. Dum sia tempo ***K. Markso*** skribis: «Varo iĝis mono, antaŭ ĉio kiel unueco de mezurilo de valoroj kaj rimedo de cirkulado, aŭ – unueco de mezurilo de valoro kaj rimedo de cirkulado estas mono» [6, p. 106]. Jenoj du funkcioj sur la fono de kvin bazaj estas principe gravaj. Se iu aktivo ne havas almenaŭ unu da du konsideritaj funkcioj (eĉ se havas ĉiujn restajn bazajn), tiam ĝi ne povas esti mono.

3. Mono kiel rimedo de akumulado (konservilo de valoro). La posedanto de mono estas mastro de aĉeta kapableco kaj ricevas eblecon distribui sian konsumadon dum tempo, t.e. decidi, kiam fari transakcion: hodiaŭ, morgaŭ aŭ post

jaro. Monon eble meti sur banka konto kaj atendi optimuman momenton por farado de transakcio. Krom tio, difinita mona sumo, kiel regule, devas deponi kiel garantio de pagipoveco de ekonomia aganto. Kutime oni konsideras, ke **tri funkcioj** (rimedo de cirkulado, mezurilo de valoro kaj rimedo de akumulado) estas ***la plej esencaj*** kaj sufiĉe plene respegulas esencon de mono.

4. Mono kiel rimedo de pagado. La funkcio de mono kiel rimedo de pagado estas strikte ligita kun funkcio de rimedo de cirkulado. Varoj interŝanĝas kontraŭ mono nune, ĝi ankaŭ povas transformiĝi en promeson pagi monon future. Tiamaniere, mono helpas realigi futuraĵajn pagojn.

La funkcio de rimedo de pagado estas «integrala funkcio», ĝi funkcias kiel siaspeca rezultato de funkcioj de rimedo de akumulado, mezurilo de valoro, sed ĉefe kiel rimedo de cirkulado. Decas rimarkigi, ke dum lastaj jaroj ĉiam pli multa nombro da interkonsentoj realiĝas kredite sur la bazo de plastaj kartoj kaj bankaj elektronikaj kontoj. Precize pro tio multaj ekonomistoj konsideras, ke nuntempe la funkcio de rimedo de pagado praktike kunfandiĝis kun la funkcio de rimedo de cirkulado (sur **bildo 2** tio ĉi estas figurita kun helpo de indikilo).

5. Monda mono. Laŭ vortoj de Karlo Markso, sur monda merkato naciaj monoj demetas siajn «naciajn uniformojn» (de moneroj, paperaj kaj kreditaj monoj) kaj ekmarŝas en uniformo de grandivaloraj metaloj. Tamen post disfalo de *Bretton Woods* internacia sistemo en 1971 jaro naciaj monoj praktike perdis striktan ligon kun oro kaj ceteraj grandvaloraj metaloj. Pro tio en ekonomika literaturo aperis vidpunkto, laŭ kiu la funkcio de monda mono ĉesis sian ekzistadon. Sed tio ĉi ne estas tiele. Jena funkcio ĉesis demonstri sin en tradicia aspekto. Samtempe funkcion de monda mono plenumas, tiel nomitaj, rezervaj valutoj.

La derivaĵaj funkcioj de mono. En diferenco de bazaj, **la derivaĵaj funkcioj** ne difinas esencon de mono, sed precipe suplementas kaj konkretigas (**bildo 2**).

6. Informa funkcio. La rolo de jena fonkcio kreskas kun disvolviĝo de mono. Dum fruaj stadioj de var-monaj rilatoj la informa funkcio sin manifestis nesignife.

Tamen la situacio kardinale ŝanĝiĝis kun apero de banka sistemo, kaj precipe kun distingigo de centraj bankoj. La centra banko, monopoliginte emisio de mono, akiris eblecon ricevi detalan informon pri maso, strukturo, rapideco de mona cirkulado, kaj same pri multaj aliaj fenomenoj de ekonomia vivo de socio. Monaj fluoj en banka sektoro, pasante tra kontoj de komerciaj bankoj kaj nebankaj institucioj, tion ĉi informon konkretigas kaj precizigas.

7. Produktiva funkcio. Produktiva funkcio baziĝas sur tri bazaj funkcioj de mono: mezurilo de valoro, rimedo de cirkulado kaj rimedo de akumulado.

A) Produktiveco de mono kiel rimedo de valoro. Apero de mono, kiel ĝenerala kalkula unueco, estas bazo de produktiveco de mono. Mono ŝparas rimedfontojn kaj malplialtiĝas nombron da operacioj.

Б) Produktiveco de mono kiel rimedo de cirkulado. Kiel funkcio de rimedo de cirkuleco mono same kontribuas al plialtigo de produktiveco.

*B) Produktiveco de mono kiel rimedo de akumulado***.** Por sukcesa plenumo de funkcio de rimedo de cirkulado ekonomia aktivo devas esti likva, postuli minimumon de elspezoj por deponado. Mono estas la plej likva ekonomia aktivo kaj havas nealtajn espezojn de deponado. Tio ĉi same kuŝas en bazo de produktiveca funcio de mono.

8. Senjoraĝa funkcio (funkcio de emisia enspezo). Jena funkcio aperas ĉe du necesaj kondiĉoj: 1) monopolo por produktado de mono (**monera insignaro**) kaj 2) pli malaltaj kostoj de produktado de mono, ol prezo, kiun ĝi demonstras en cirkulado. La ĥaraktero de mono mem subkomprenas ĝian monopolan ĥarakteron. Ekzemple, terpomo aŭ greno en *kutimaj merkataj* kondiĉoj ne povas esti monopola varo. Do mono laŭ sia esenco postulas monopoligon de produktado.

En modernaj kondiĉoj monopolon por kreado de mono posedas centra banko de ŝtato. Pro tio la mono de centra banko estas unu da plej grava fonto de enspezo de ŝtato.

9. Regulanta funkcio. Mono posedas kapablecon efiki regulante al disvolviĝo de ekonomio. Jam antaŭ multaj jarcentoj kun helpo de mono realigiĝis la fiska (buĝeta-imposta) politiko de ŝtato. Dum lastaj jaroj ĉiarimede plifortiĝis

graveco de *mona (mona-kredita) politiko*. Centra banko transformiĝis en veran centron de reguligo de ekonomia disvolviĝo de lando, utiliginte tiajn ĉi ilojn, kiel administro per mona maso pere operacioj sur ovra merkato, formado de diskonta interezo ktp. Ne okaze, ke la ekonomika doktrino de evoluintaj landoj ekde 1970-aj jaroj iĝis la monetarismo.

10. Institucia funkcio. Mono havas revolucian influon al institucia disvolviĝo de ekonomio. Mono estas unu da ĉefaj atributoj de socia demokratigo. Ankoraŭ en Antikva Grekio la disvolviĝo de mona cirkulado estis gravega faktoro de formado de greka demokratio. Mono subfosis fundamenton de feŭdala kaj socialisma socio, detruinte tiajn arĥaikajn soci-ekonomiajn strukturojn. Mono ĉiarimede altigas liberon de ekonomia disvolviĝo, kiel sur makro-nivelo, tiel ankaŭ sur mikro-nivelo. Multenombraj historiaj ekzemploj klare pruvas grandan vivkapabkecon kaj elastecon, eblecon al progreso de merkataj socioj kun alta disvolviĝo de mona rilatoj. En mona ekonomio la ekonomia individuo ricevas nekompare pli altan nivelon de libero de elekto, relative kun la individuo en senmona socio. Mono estas **atributo de sendependa lando, de nacio**. Kaj tio ĉi ankaŭ estsas la plej grava elemento de institucia funkcio de mono.

Funkcioj de mono estas multinombraj kaj multsignifaj. Pro tio ne eblas pensi, ke per jenaj funkcioj sin limigas ĝia rondo. Ĉe esploro de mono sur konkretaj historiaj kondiĉoj povas esti aperigis ankaŭ aliaj funkcioj, ekzemple, **militara**, **magia**, **korupcia** ktp.

2. Funkcioj de lingvo

Transirante al rigardo de funkcioj de lingvo, kaj komparante ilin kun funkcioj de mono, ni renkontis kun multenombraj paraleloj.

Parolada agado, kiel ankaŭ ĉiu alia, laŭ sia ĥaraktero estas funkcia [2, p.18]. Doktrino pri ***funkcioj de lingvo*** unu da unuaj komencis krei ***Karl Bühler*** (1879-1963): funkcio de esprimo, alvoko kaj prezentado [14, p. 28]. Aŭstria psiĥologo ***Friedrich Kainz*** (1897-1977) kaj germana lingvisto ***Karl Ammer*** (1911-1970) distingas funkciojn de lingvo, kiuj nepre manifestiĝas en ĉiu parola akto

(«***primaraj funkcioj***»), kaj tioj, kiuj estas fakultaj («***sekundaraj funkcioj***») [4, p.101]. Aŭtoroj de «Ĝenerala lingvoscienco» markas kiel *ĉefaj* funkcioj – **tri [9, p. 29]**:

- rimedo de kunesto de homoj;
- baza elemento de pensado;
- rimedo de konservo kaj transdono de socia-historia sperto de homoj.

Ni estas solidaraj kun la lasta klasifiko kaj konsideras ĝin tre produktivan, sed nesufiĉan. Kongrue kun nia metodologio, ni distingas sekvan hierarkion de funkcioj de lingvo.

- ***Ĉefa funkcio***, ĉiuj restaj estas ĝia konsekvencoj. La ĉefa funkcio konkretiĝas en *bazaj* (*primaraj*) kaj *derivaĵaj* (*sekundaraj*).
- ***Bazaj funkcioj*** difinas esencon de lingvo, formas **enhavon** de tio ĉi kategorio.
- ***Dervaĵaj funkcioj*** ĉion esencon ne difinas, sed konkretiĝas kaj aldonas.



Bildo 3. Funkcioj de lingvo

La ĉefa funkcio de lingvo estas komunikada. Komunikado signifas kontakto, transdono de pensoj, interŝanĝo per informo. Alivorte, lingvo aperis kaj

egzistas, antaŭ ĉiu, por tio, ke homoj povus kunesti [8, p. 64]. Informo estas la sciigoj, atingeblaj por kompreno kaj gravaj por konduto de tiu, al kiu ili estas adresitaj. *Longvo estas rimedo, ilo de kunesto*. Tie ĉi ni kunpuŝiĝas kun la unua surprizo. La parolo estas pri eldiro de ***J.A. Levicki***, kiu, rezonante pri komunika funkcio de lingvo, nomas ĝin ***bazan*** (ĉefan, kongrue kun nia klasifiko. – ***A.S***.) kaj ***solan!*** [2, p. 23]. Tio ĉi estas aparte rimarkebla en komparado kun eldiro de ***M. Rothbard***, pri la ĉefa kaj la sola funkcio de mono, kiu estas citita pli alte.

Tiamaniere, se ĉefa funkcio de mono estas kreado de optimumaj kondiĉoj de interŝanĝo de varoj, la ĉefa funkcio de lingvo estas kreado optimumaj kondiĉoj de interŝanĝo per informo (**bildo 3**). Nun ni transiru al komparo de bazaj funkcioj.

Bazaj funkcioj de lingvo. Antaŭ ĉio, la parolo estas pri mencitaj trioj: *rimedo de kunesto de homoj*, *baza elemento de pensado*, *rimedo de konservado kaj transdono de homa sperto*. Tia ĉi lingva triado formas la plej gravan de bazaj funkcioj same kiel de mona triado: rimedo de cirkulado; mezurilo de valoro kaj rimedo de akumulado.

1. Funkcio de rimedo de kunesto (kontakto, komunikiĝo) de homoj estas unu da aspektoj de ĉefa, kumunika funkcio, simile al tio, kiel mona funkcio de rimedo de kunesto estas unu da aspektoj de ĉefa funkcio de kreado optimumaj kondiĉoj de interŝanĝo per varoj. La ĉefa funkcio de mono ĝeneraligas ĉiujn funciojn de mono, kaj la ĉefa funkcio de lingvo ĝeneraligas ĉiujn ĝian funkciojn.

2. Funkcio pensa (kognitiva *aŭ* **konstrukcia)** plej malvastmaniere estas ligata kun antaŭa funkcio. Komunika funkcio kultivas, «generas» pensan funkcion [2, p. 68].

Kun helpo de cebro homo pensas. Kun helpo de lingvo la penso ekposedas konkrete-palpan formon, kiu povas perceptiĝas de alia homo. Tiel lingvo plenumas **funkcion de formado de penso** aŭ pensformantan funkcion. Komunikiĝa kaj pensa funkcio kaŭzas unu la alian. Ne eblas diri, ke unu da ili estas primara, kaj alia estas sekundara rilate al la unua. Lingvo estas ne simple formo aŭ kovraĵo por penso, kaj eĉ ne rimedo, sed maniero de pensado**.**

Jena funkcio en iu grado korelacias kun mona funkcio de mezurilo de valoro. Se la funkcio de mezurilo de valoro taksas tutan varan vicon de ekonomia sfero, la pensa funkcio «taksas» rilatojn de homa socio kaj ĉirkaŭanta naturo.

3. Funkcio de rimedo de konservado de sperto. Alie oni nomiĝas ĝin ankaŭ **akumulativa, ŝpara, ekkona, konservacia.** Tio ĉi estas funkcio de akumulado de scioj, akumulado de rezultoj de ekkona proceso, akumulado de socia sperto kaj scioj.

Homo ekkonas la mondon kun helpo de nocioj. Homo povas pense vojaĝi en la tempo kaj la spaco. La nocio formiĝas en proceso de praktika agado de homo dank'al kapableco al abstraktado. Dank'al abstraktado distingiĝas gravegaj atributoj de fenomenoj, kiuj formas nociojn. Sur la bazo de konkretaj signifoj formiĝas abstraktaj kategorioj. Por transdoni informon de estanto al estoneco (de pasinto al estanto), ĝi devas havas eblecon konserviĝi. Tiele, realiĝas sinsekveco de homa kulturo, akumulado kaj asimiligo de sperto de antaŭaj generecioj. Ne necesas specifaj mensaj penoj, por kompreni, ke al jena funkcio en ekonomia sfero kongruas funkcio de mono, kiel rimedo de akumulado.

4. Funkcio de transdono de sperto priperas transdonon de informo en spaco kaj tempo. Ĝi estas strikte ligita kun funkcio de rimedo de kunesto de homoj kaj kun funkcio de akumulado de informo. En ekonomia sfero ĝia fratino estas funkcio de pagado.

5. Funkcio de monda lingvo, do naturale, estas parenco de funkcio de monda mono. En sfero de ekonomiko la funkcion de monda mono plenumas rezervaj valutoj. Nuntempe ili estas kvin: usona dolaro, eŭro, brita pundo, japana jeno, svisa franko. Dum lastaj jaroj en sesan rezervan valuton impetege transformiĝas ĉina juano, kiu sendube iĝos ĝi dum plej proksimaj du jardekoj.

En sfero de lingvo ĉiu estas pli komplika. Post demuntado de USSR, la rolon de monda lingvo prenis al si la angla lingvo. Kaj tio ĉi havas lokon eĉ en Eŭrounio, kie pozicioj de Britujo, kvankam estas nemalmulte gravaj, sed ne determinantaj. Ni rigardu la problemon de monda lingvo en sekvanta parto de jena artikolo, pro ĝia speciala signifo.

Derivaĵaj funkcioj de lingvo. La derivaĵaj funkcioj suplementas bazajn. Inter derivaĵaj kaj bazaj kategorioj samtempe ne estas simple instali la apartigon. Krome, tio, kio iuj lingvistoj iutempe imputas al bazaj, aliaj – al derivaĵaj, kaj male. Kaj tio ĉi dependas de multaj faktoroj: de konkretaj situacioj, de mondkonceptaj pozicioj de esploristo ktp. Krom tio, funkcia terminologio tute ne estas unueca, kaj iu komunuza klasifiko ankoraŭ ne ekzistas.

Parolante pri derivaĵaj funkcioj de lingvo, neeble munti rigidajn papalelojn kun derivaĵaj funkcioj de mono. Do tamen, certaj komparadoj sin intrudas iafoje mem. Kaj, antaŭ ĉiu, la parolo pri regulacia funkcio.

6. Apelacia, (*aŭ* regulacia, direktiva, ritorika, stimula, pragmata) funkcio. La funkcio de influo al membro de jena lingva kolektivo: stimuli al agado aŭ malpermesi. La funkcio estas strikte ligita kun komunikacia.

Rezulte, regulacia funkcio estas direktita al kreado, subteno kaj regulado de rilatoj en homaj mikrokolektivoj.

Kun jena funkcio estas sufiĉe strikte ligita **fata** (*de greka*: ***Phatos*** – “dirita”) **(kontakta) funkcio** aŭ funkcio de rilato, establo de kontakto kun konversacianto.

7. Esprima funkcio (aŭ **estetika** kaj **poezia).** Kun helpo de lingvo la penso esprimas kiel subjektiva bildo de koncepto de la mondo, per tio lingvo plenumas **funkciojn de esprimo de penso** aŭ espriman funkcion. En jena kazo realiĝas elekto de harmoniaj asonancoj, aperigo de estetikaj ecoj de lingvo en proceso de kreado de beletraj tekstoj.

8. Emocia (emocie-esprimiva) funkcio estas funkcio de homaj emocioj, esprimado de sentoj kaj volo de parolanto. La rialto de parolanta (skribanta) al enhavo de propraj parolaj verkoj.

9. Nominativa funkcio (nomado de aĵoj per vortoj). Dank’al lingvo kreiĝas subjektiva bildo de fenomenoj de objektiva mondo. Lingvo plenumas funkcion de subjektiva indiko de la objektiva mondo, t.e. nominativan funkcion.

Tia ĉi funkcio estas nerompeble ligita kun ekkona (kun funkcio de konservado de sperto aŭ akumulativa). La nomado estas neforprenebla parto de ekkono. Distinginte esencajn atributoj de fenomeno, homo impetas fiksi ricevitan scion

vorte. Aperas nomoj, kiel propraj, tiel ankaŭ komunaj. Aperas terminaro, kiel de scenca, tiel ankaŭ de praktika agado. Kun jena funkcio strikte ligita **referenca** aŭ **informa** funkcio (mesaĝo de informo).

10. Institucia funkcio de lingvo estas ligita kun tiaj ĉi nocioj, kiel **etna** (lingvo uniĝas etno (popolo), ĝi helpas ekformiĝi al nacia sinkonscio); **korporacia** (unuigas homojn en klasojn kaj grupojn: «li parlas kiel ni, tio signifas, li estas unu da ni»).

Krom tio, multaj esploristoj atentas ankaŭ al aliaj funkcioj de lingvo, ekzemple, **magia (sorĉa) funkcio** realiĝas en specifaj situacioj, kiam lingvo haviĝas per superhoma, «transaĵa» forto; tajlerana funkcio (***Ch.-M. de Talleyrand,*** 1754-1838 – franca diplomato): poveco kaŝi post vortoj siajn pensojn [10, p. 32-33.], ktp.

3. Monda mono kaj monda lingvo

Ni transiru al la lasta problemo, traktata en jena artikolo: al la problemo de funkcionado de lingvo kaj mono sur internacia (monda) nivelo. Tia ĉi problemo estas tre aktuala, precize en ĝi interplektiĝas interesoj tutmondaj, interŝtataj, ekonomiaj, politikaj tkp. Dekomence ni restu sur kategorio de ***«monda lingvo».***

En sociolingvistiko oni distingas 5 komunikajn rangojn de lingvoj, difinitajn dependence de funkcioj de lingvoj en interŝtata kaj interetna kunesto [7, p. 121]. Sur la pinto de tia ĉi piramido estas 6 tiel nomitaj «mondaj lingvoj», en la bazo de la piramido estas centoj de senskribaj «lokaj lingvoj», kiuj uziĝas nur ene de sia etna kolektivo (**bildo 4**).

Mondaj lingvoj estas lingvoj de interetna kaj interŝtata kunesto, havantaj statuson de oficiaj kaj laboraj lingvoj de OUN: la angla, la araba, la hispana, la ĉina, la rusa kaj la franca.

En Eŭropo, Mediteraneo, sur Proksima Oriento la unua monda lingvo estis la greka; poste – la latina. Dum la XVI-XVII jarcentoj la unua monda lingvo iĝis la portugala. Dum la XVIII jarcento ĝi cedis la unuaeco al la franca, kiu de la dua duono de la XIX jarcento komencis elpuŝiĝis per la angla lingvo. Post de la

demuntado de USSR la monopolo de la angla lingvo kiel monda, kiel «lingvo de tutmondiĝo» atingis sian kulminon.

Internaciaj lingvoj eluziĝas en internacia kaj interetna kunesto kaj ili, kiel regulo, havas juran statuson de ŝtata aŭ oficiala lingvo ***en vico de landoj***. Al tiaj lingvoj apartenas tiaj ĉi, kiel la portugala, la germana, la sŭahila kaj kelkaj aliaj.



Bildo 4. Dependeco inter kommunika rango de lingvo kaj volumeno de realigantaj per ĝi komuniko

Ŝtataj (naciaj) lingvoj havas juran statuson de ŝtata lingvo aŭ fakte plenumas funkciojn de baza lingvo en unu lando.

Regionaj lingvoj estas lingvoj de interentna kunesto, kiel regulo, skribaj, tamen ne havas statuson de oficiala aŭ ŝtata lingvo (ekzemple, la tibeta lingvo en Ĉinio).

Lokaj lingvoj, kiel regulo, estas senskribaj, uziĝas en buŝa neoficiala kunesto nur ene de etnaj grupoj.

Laŭ taksado de ***Christian Lehmann*** (Germanujo), la maksimuma nombro da lingvoj sur la Tero estis en la XV jarcento. Al komenco de nuna jarcento ilia nombro plimalaltiĝis ĝis **6000,** kaj al fino de XXI jarcento saviĝos preskaŭ 600 lingvoj [3, p. 181].

Kio koncernas monon, tie ĉi, laŭ nia opinio, ankaŭ eble distingi ĉiujn cititajn kvin rangojn, jen nur la nombro da naciaj valutoj en nia tempo kompilas preskaŭ **160**, kaj same havas tendencion al reduktado.

Al monda mono apartenas rezervaj valutoj, kiuj jam estis cititaj: amerika dolaro; eŭro; japana jeno; angla pundo kaj, kun iuj rimarkigoj, svisa franko. Tamen esence (kun konsidero de kvoto de interkonsentoj en monda ekonomio) inter ili distingiĝas amerika dolaro kaj eŭro. Unikeco de eŭro estas entenata en tio, ke tia ĉi monda valuto samtempe estas ankaŭ **internacia.** Provoj de kreado de internaciaj monaj unioj entreprenigas same en Suda Ameriko, Afriko kaj en Arabaj landoj.

Ŝtata mono estas la plimulto da naciaj valutoj, kiuj havas precipan cirkuladon en unu lando.

En iuj landoj estas ankoraŭ **regiona mono**. Ekzemple, skotlandaj pundoj en la nuntempa Unuiĝinta Reĝlando aŭ finnlandaj markoj en antaŭrevolucia Rusujo. Tamen, tiaj ekzamploj estas relative nemultaj.

Spontane povas aperi ankaŭ «**loka mono»**, sed tio ĉi okazas, kiel regule, dum tempo de subitŝanĝaj historiaj eventoj, tiaj kiel revolucioj kaj militoj. Decas mencii, ke iuj landoj entute malbezonas nacian valuton, uzante por interkonsentoj monojn de aliaj landoj.

En nuna tempo en la mondo formiĝas unika situacio, kiu estas entenata en tio, ke ĉefa monda valuto estas la usona dolaro, kaj la ĉefa monda lingvo estas la angla. Ĉe tio ĉi, se justeco de jena valuta monopolo ĉiam pli active metas en dubon en sciencaj kaj aferaj rondoj, dum justeco de la dua diskutiĝas nur epizode.

Usona dolaro transformiĝis en mondan valuton post 1945 jaro. Dum tia tempo, kiam Eŭropo kuŝis en postmilitaj ruinoj, la kvoto da Usono kompilis duonon da monda ekonomio. Nuntempe tia ĉi kvoto falis duoble kaj daŭrigas reduktiĝi.

La monda financa krizo, komenciĝinte en Usono en 2007 jaro, konsiderinde ekŝancelis poziciojn de la amerika ekonomio. De alia flanko, ĉe Usono dum lastaj jaroj aperis fortegaj konkurentoj en la personigoj de EU kaj Ĉinio. Plifortigo de konkurenta lukto ĉiam pli akre metas sub dubon la problemon pri gvidanta rolo de la usona dolaro en monda ekonomio. Dum lasta tempo sur tion rolon ĉiam pli insiste pretendas la eŭro. Pasos du-tri dekjaroj kaj la ĉefa monda valuto povos esti la ĉina juano.

Mondaj lingvoj plenumas ĉiujn bazajn kaj derivaĵajn funkciojn ne nur ene de lando, sed en skaloj de monda ekonomio. La lando, prenanta al si jenan respondecan ŝarĝon, kune kun tio ricevas grandegan profiton. Sufiĉe atentigi pri senjoraĝa funkcio. Havante monopolon sur emisio de la usonaj dolaroj ricevas grandegan senjoraĝan enspezon, tio estas, ebleco de «senpaga» ricevado de mondaj riĉecoj en ĉiuj formoj: nafto, oro, multekostaj metaloj, produktaĵo de industrio, agrikulturo ktp. Kompreneble, ke ĉe tio Usono dum lastaj jaroj devigis uzi «senjoraĝan ŝargadon» ĉiam pli singardeme, antaŭ la vizaĝo de impetege kreskanta ena kaj eksrera ŝuldo.

Post la demuntado de USSR en 1991 jaro monopolon de monda lingvo same prenis al si Usono, ke donas al jena lando (kiel al ceteraj anglalingvanaj) ne malpli multe, sed povas esti, pli multe da profitoj, ol mona monopolo. La listo de tioj ĉi profitoj estas sufiĉe longa. Tio ĉi estas ne nur kultura, scienca, ideologia, politika domino, sed ankaŭ grandegaj avantaĝoj en sfero de ekonomio kaj finanso.

Fariĝas unika situacio, kiam en EU, kie kvoto de Britujo tute ne estas monopola nek en unu sfero, kiel lingvo de internacia komunikiĝo dominas la angla.

Dum lastaj jaroj en EU ĉiam pli aktiva demonstras sin la fortoj, kiuj starigas sub dubo la monopolon de la angla lingvo. Konekse al tio ĉi necese atentigi pri plifortigo de eŭropa politika movado «Eŭropo-Demokratio-Esperanto», anoncis kiel la bazo de sia platformo starigon de Esperanto kiel oficiala lingvo de Eŭrounio. La pozicioj de tio ĉi movado, kiu embriĝis en 2003 jaro en Francujo, dum lastaj jaroj fortiĝas, kaj, antaŭ ĉio, en tiaj landoj de EU, kiel Francujo, Germanujo, Pollando, Hungarujo kaj aliaj.

Ni finigu tian ĉi artikolon per ripeto de la epigrafo: «Mono estas lingvo de ekonomio; lingvo estas oro de homaro».

Literaturo

1. *Гак В.Г.* Языковые преобразования: некоторые аспекты лингвистической науки в конце XX века. От ситуации к высказыванию. Изд. 2-е. – М.: Книжный дом «ЛИБРОКОМ», 2009. 368 с.
2. *Левицкий Ю.А.* Общее языкознание. 5-е изд. – М.: Книжный дом «ЛИБРОКОМ», 2013. 266 с.
3. *Леман К.* Документация языков, находящихся под угрозой вымирания (Первоочередная задача лингвистики) //Вопросы языкознания. 1996. № 2. с. 180-191.
4. *Леонтьев А.А*. Общественные функции языка и его функциональные эквиваленты //Язык и общество /под. ред. Ф.П. Филина. – М., 1968. с. 99-110.
5. *Маркс К.* Капитал. – Маркс К., Энгельс Ф. Соч. Т.23. С. 84.
6. *Маркс К.* К критике политической экономии. – Маркс К., Энгельс Ф. Соч. Т. 13 С. 106.
7. *Мечковская Н.Б*. Общее языкознание. Структурная и социальная типология языков. – М.: Изд. 8-е – М.: Флинта, 2011. 312 с.
8. *Норманн Б.Ю.* Теория языка. Вводный курс. 3-е изд. – М.: Флинта: Наука, 2009. 296 с.
9. *Общее* языкознание /под общей ред. А.Е. Супруна. – Минск: Вышэйшая школа, 1984. 456 с.
10. *Попова З.Д.* Общее языкознание. – Воронеж. ВГУ. 1987. 211 с.
11. *Ротбард М.* Государство и деньги. – М.: СОЦИУМ, 2004. 176 с.
12. *Селищев А.*С. Деньги. Кредит. Банки. – СПб.: Питер, 2007. 427 с.
13. *Соссюр Ф.* де. Курс общей лингвистики. – М.: Книжный дом «ЛИБРОКОМ», 2009. 256 с.
14. *Bühler K.* Sprachtheorie. Die Darstellungfunktion der Sprache. – Jena: Verlag von. C. Fischer, 1934. 434 S.
15. *Rossi-Landi F*. Il linguaggio come lavoro e como mercato. – Milano: Bompiani. 1968. 243 p.